

Hector Hodler, 16-a parto : Louis Couturat endanĝerigas esperanton
Claude Gacond, 359-a radioprelego, 1970.08.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- La broŝuro de Louis Couturat pri la esperanta vortfarado estis multilate tre danĝera. Ĝin legante Hector Hodler kaj Harold Bolingbroke Mudie tuj komprenis, ke la momento estis tre grava, kaj ke se la esperantistoj ne kapablos plej rapide sin unuigi en tutmonda organizaĵo, ili riskos esti viktimoj de lertaj eksteruloj.

Cl.- Ili respondis al la provokado de Louis Couturat per la kreo de Universala Esperanto-Asocio.

A.- Se oni atente legas la broŝuron *Etude sur la dérivation en espéranto* [*Studo pri la Derivado en Esperanto*] de Louis Couturat, oni nur povas miri pri ĝia sukceso.

Cl.- La influo de tiu broŝuro troviĝas en tio, ke ĝi estis verkita de bone konata filozofo kaj redaktita en la franca. Plie, kaj tio ne estas malmulto, ĝi ne provis detrui la tiamajn sociajn antaŭjuĝojn.

A.- Louis Couturat ekzemple reliefigis la superecon de la kleruloj. Aŭdu kion li diras pri la industriistoj kaj komercistoj.

Cl.- « *Oni ne povas lasi al la industriistoj kaj al la komercistoj la taskon mem fabrikii la nomojn de iliaj produktoj. Oni scias, kiom da barbarajoj ili jam alportis en la naturajn lingvojn ; ili havas nek la kompetenton, nek la trankvilecon por povi formi derivaĵojn aŭ kunmetaĵojn, kiuj estu korektaj kaj klaraj ; estos do necese alporti al ili la vortojn jam tute faritajn.* »

A.- Ni ne forgesu, ke Louis Couturat verkis sian broŝuron por influi la komitatanojn de la Delegitaro, tio estas sciencistoj kaj lingvistoj. Li flatis ilian klasemon. Pri la popolamaso, jen kion li skribas :

Cl.- « *Estas nur la klera eminentularo, kiu estas kapabla kaj kompetenta por uzi la afiksojn en la celo forĝi novajn vortojn ; la popolamaso devos kontentiĝi lerni la vortojn jam tute faritajn, ilin ĉerpante el la lernolibroj kaj vortaroj.* »

A.- Kia diferenco de spirito kun la diroj de Zamenhof, ĉu ne ?

Cl.- Louis Couturat avertas la esperantistojn, ke ili devos forlasi sian emon mem decidi pri la signifo de la vortoj :

A.- « *La esperantistoj devos akiri novajn kutimojn kaj ĉefe devos forlasi la malnovajn kaj aĉajn kutimojn.* »

Cl.- Louis Couturat diras, ke la esperantistoj estas trompitaj aŭ malliberigitaj de fetiĉismo. Oni tuj sin demandas, kiu estis la trompanto. Verŝajne Zamenhof.

A.- Pri la gvidantoj de la esperanto-movado, kiuj favoris observadon al la *Fundamento*, Louis Couturat skribis :

A.- « *Kio estas vere danĝera, tio estas la dogmo de la neŝanĝebleco kaj la fanatikeco, per kiu oni ĝin encerbigas al la esperantistoj.* »

Cl.- Ni ne havas la tempon analizi la argumentadon de Louis Couturat pri la esperanta vortfarado. Vi nur sciu, ke ĝi pekis je la bazo, ĉar kvankam Louis Couturat konstatis, ke la signifo de la vortoj dependas de la gramatika karaktero de la radikoj, tamen li argumentis, kiel

se tio ne estas. El tio li montris sin tute ne scienca. Oni trovas frazojn, kiel : « *Sed la signifo ne devus dependi de la gramatika karaktero de la radikoj.* » Vane ni serĉos pravigon de tiu sinteno. Tio ne devas esti. Jen la argumentado, ĉar tio ne estas logika.

A.- Dum Zamenhof observis la lingvojn por konstrui ion, kiu korespondas al la lingvo-fenomeno mem kaj al la homa pensmaniero, Louis Couturat abstrakte decidas, kio estas logika aŭ ne logika, kio devas esti aŭ ne esti en la internacia lingvo.

Cl.- Li tiel malbone observis esperanton, ke li eĉ ne malkovris, ke ĝi malsimilas de la latinidaj lingvoj. Pro tio lia argumentado jam nur pro tio kondukis al senelirejo.

A.- Louis Couturat distingas en esperanto du derivadojn : la tujan derivadon, kiu formas vortojn helpe de la gramatikaj finiĝoj kaj la peran derivadon, kiu bezonas afiksojn.

Cl.- Li konstatas, ke ofte estas manko de paralelismo inter la signifo kaj la formo, kiam oni derivas vortojn el radikoj. Se li estus rigardinta al la gramatika karaktero de tiuj radikoj, li estus kompreninta, ke ili ne estas kompareblaj. Tion rebatos René de Saussure en 1910.

A.- Por li, ĉar oni diras **balailo**, **kudrilo** kaj **skribilo**, oni devus diri **tamburilo**, **martelilo** kaj **broŝilo** anstataŭ tamburo, martelo kaj broso.

Cl.- Se oni ne volas vidi, ke la unuaj estas formataj el verbaj radikoj, dum la ceteraj el substantivaj radikoj, oni vidas en esperanto nur nelogikaĵon, kiu pekas kontraŭ la leĝo de la inversebleco.

A.- Samtempe Louis Couturat tamen devos konsideri la gramatikajn karakterojn de la sufiksoj, kaj ĉar li ne volis vidi, ke la radikoj **grand**, **fort**, **bel** estas en si mem adjektivoj dum **parol**, **kur** kaj **plor** estas verboj, li devos proponi ege abstraktajn sufiksojn, kiuj kompanse transprenas tiujn gramatikajn signifojn.

Cl.- Tiuj sufiksoj estas **uz**, **iz**, **oz**, **iv**, **if**, **ag**, kaj tiel plu.

A.- Por doni ekzemplon pri tiuj sufiksoj ni prenu la radikojn **arm** kaj **lum**. En esperanto ambaŭ estas verbaj radikoj : **armi**, **lumi**.

Cl.- La simplaj esperantaj formoj **armi**, **armado** fariĝas ĉe Louis Couturat **armizi**, **armizado**.

A.- Laŭ Couturat oni devas distingi inter **lumi** kaj **lumizi** ; **lumi** estas fari lumon kiel lumanta vermo, dum **lumizi** estas fari lumon kiel lampo.

Cl.- Unuflanke Louis Couturat faris kelkajn pravajn kritikojn, sed aliflanke li ilin ĉirkaŭis de tiom da nelogikaĵoj, kaj tio nome de la logiko mem, ke sur esperanton lia verko ne havas grandan influon.

A.- Sed fakte Louis Couturat volis influi neesperantistojn. Sed al la esperantistoj li diris :

Cl.- « *Se esperanto volas vivi kaj prosperi, estas grave, ke ĝi sin laksigu de tiuj elementoj de dekadenco kaj de diseco, kaj ke ĝi perfektigu kaj disvolviĝu konforme al siaj veraj principoj.* »

A.- Sed tiuj « *veraj principoj* » estas la erarigaj ideoj mem de Louis Couturat.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-